É 100% Regular

Os verbos podem ser aprendidos em 10minutos.

Se tomar bom conhecimento, vai se apaixonar !

GISTO, Marto, 2011.
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktis ottovaske@ibest.com.br
Donace por VK-ĉeestantoj
Krom loĝantoj for de POA,R$01,00

MALKONTENTO

BV ne pensi ke mi volas semi malkontenton inter niaj VK-rondanoj sed, konsideru serioze, ĉu homo kiu promesas ion sed tion ne plenumas, dum du tri monatoj sinsekvaj, daŭras fidinda batalanto favore al nia malrapida kvazaŭ stagna E-movado? Certe aĉe efikus se mi kuraĝe fingromontrus ties nomojn . Tial, mi petas, ĉiu pentofare reviziu sian konsciencon, ĉerpu entuziasmon kaj pentofare ŝanĝu sian agmanieron. Evaluu, ĉu kaŭzas pli da prospero grupo malgranda sed vigla ol armeo da neglektularo en iu ajn movado. En nia kazo, neglektulo estas ĉiu komencanto kiu neniel provas perfektigi sian E-scion, skriban kaj parolan. Stagnas grupo kiu kontentas kun malaltnivela scio. Oni devas kompari sin kun aliŝtataj grupoj indaj je admiro kaj honti se oni malsuperas aliajn E-grupojn. Tial, vekiĝu karuloj, ni ne pigru!

MALKONTENTO-II

Aldone, mi ripetas la demandon faritan eble tri monatojn antaŭe, tial ke neniu sin degnis reagi, eĉ ne dum VK-kunsido: kiom da diferencajn vortaroj vi posedas hejme k. kiomfoje vi foliumis unu el ili dum unu jaro? Mi vetas ke ne pli ol fingroj de unu mano. Ĉu tia estas edifa sinteno utila por lante riĉigi sian enkapan vortaron? Estu nebezone laŭte konfesi tion al nia ĉeestantaro. Sufiĉas ke ĉiu “pekulo” hontu, promesu al si vekiĝon kaj plenumu ĉi promeson. Mi garantias al vi kontenton same intensan de homo kiu sukcesis forlasi fumon kaj drinkadon.

PLENFORTA KARAKTERO.

Plenplena vigleco de viro, necesa por atingi la elektitan celon en ies vivo dependas ne nur de lia mensa sanstato kaj studo sed ankaŭ de la fizika integreco almenaŭ komparebla kun la averaĝa viraro. Pri tio konvinkis min la aŭtoro de verko far fama doktoro kirurgiisto. Mi iĝis profunde impresita pro la fakto ke mi mem ofte spertis tian situacion dum mia multjara vivo, ĉefe nun post kiam mi trovis paĝon kun la nomaro de gravuloj en la mondo korespondaj al ties respektivaj “viraj dokumentoj”. La problemo de viroj ne riĉe dotitaj komenciĝas ekde adolesko, dum kolektiva sinbano en rivero/baraĵo kun la knabegoj ĉiuj nudaj kiel Adamo estis kreita. Rikanoj okazas pro ŝercaj komparoj inter la kolegaro.Post tio ĉiu viro volenevole preferas senti sin samnivela kun aliaj viroj. Ŝancoj ekvidi la “dokumenton” de aliaj okazas en komunaj banejoj de sportkluboj, kazerno ktp. Ne kuracebla makulo en la menso postrestas dum la tuta vivo eĉ se la difekto ne tre gravas. La aŭtoro avertas chefe patrinonjn ĉar ĉi tiuj pli prizorgas siajn knabojn ril. al banoj kaj higieno, des pli longe se ili rimarkas etan nenormalaĵon dum la plenkreskado de sia filo, por antaŭzorgi utiltempan prizorgon kiel prezenti lin al kuracisto, ktp. Por substreki la enhavon de ĉi supra teksto la aŭtoro ne fuĝas de la vero ke la naturo al li ne grande favoris kaj tial foje mi ne povis eskapi el hontigaj situacioj. Tial mi forte substrekas la valoron de tiu verko. (Okazintaĵoj legeblos estonte).

AĈASPEKTA

Hieraŭ mia dentkuracisto igis min sentiĝi malbonstata dum ankoraŭ tri pliajn monatojn malgraŭ ke mia buŝo aspektas pli aĉa ol tiu de povra almozulo sen groŝo en poŝo eĉ por riparigi unu nuran denton de la supra atakfronto. Estis decidite enplanti denton. Tiucele la doktoro sarkis la stumpon kaj tuj ŝmiris kemiaĵon kaj knedis ĝin kune kun la elvenanta sango dirante ke tio iĝos solida maso kun la osto de la supra makzelo kaj sufiĉe fortikigos la "fundamenton" de tiu maĉilo. – Tial, miaj karaj VK-rondanoj, vi BV elteni ĉi oldulon kiel li statas, ĝis venos pli belaj tagoj.

ATOMUZINOJ

En la tempo kiam mi konsentis helpe alpreni la taskon, esperantigi dudek el cent eroj de teksto kies titolo estas: cent motivoj por fordanki atomenergion, mi havis oportunon konstati kiom da gravaj paneoj jam okazis en atomcentraloj, nur en Eŭropo, sen okazo de tertremo. La milaroj da tertremoj kiuj okazas tra la tuta mondo, en unu jaro, ne garantias ke neniam la naturfortoj ŝanĝiĝos al ekstreme fortaj antaŭe ne okazintaj en difinta regiono. Tial ekologisto ĉirkaŭ la mondo substrekas la neceson malplinombrigi uzinojn. Se elektro ne sufiĉos, oni bremsu la evoluon kaj la naskojn. Oni ĉesu aplaŭdi daŭran, amasan evoluon ŝanĝe de lanta, sana, kaj sekura evoluo.

REVOKO

La kara Gisto-legantaro eble minacos ŝtonumi la redaktoron de Gisto pro la reveno al fiaĉa peko de legantoj nome, forgeso. Iam oni interkonsentis ke, utila ero en niaj monataj kunsido estas: unu el niaj rondanoj laŭtlegos unupaĝan tekston de li/ŝi mem elektitan. Tio taŭgas por aŭdigi nian lingvon al homoj ĉeestantaj en la sama ejo. Same aŭ eĉ pli valoras recitado de eta poezio. Sed, domaĝo! Kelkaj el nia anaro promesis parkerigi belajn versojn tamen okazis ke de tiam ili ne plu montriĝas inter ni kvazaŭ la proponinto alparolis senkapulojn. Nur pokaj meritas laŭrojn. Tial nia E-movado velkas, stagnas.

Ĉu vi ridetos? – (Unu igas min ridegi)

EN TEATRO

Aŭtoro – Mi verkis novan teatraĵon. Ĝi nomiĝas Paradizo.

Entreprenisto – Bone, sed...kiom ni elspezos por la scenejo?

Aŭtoro - ...Tamen bildigu al vi kiom ni ŝparos pri vestaĵoj.

INTER NAJBAROJ – (Ridos pli ĝoje la homoj kiuj konas kaj ŝatas aŭdi la hispanan parolmanieron).

Ne atendite aŭdiĝis je la dua frumatene fortvoĉa tango-kantistino en komuna loĝejaro de hispanlingvanoj. Ŝi, ripete laŭ belkanto atakis per la bela tango titolita silencio (silento)... "silencjo en la noĉe...jam todo está en kalma...el muskolo duerme..."

Ĝuste en ĉi momento iu najbara gajulo decidas per tre laŭta voĉo ĥore akompani la kantistinon..."Y los vecinos tambjen!"

PANJO KLARIGAS

Noktomeze patrino kaj dekjara filino prenas taksion hejmen. Survoje videblas junaj virinoj che stratanguloj kiuj balancas siajn mansaketojn.

- Panjo, kion faras tiuj virinoj?
- Aĥ ili atendas siajn edzojn elveni de iliaj laborejoj.

La taksiisto ekridas kaj diras:

- Diru la veron al la knabino: ili estas prostituinoj kiuj atendas klientojn por ricevi pagon kontraŭ sekslaboro.

La knabino denove demandas:

- Panjo, ĉu tiuj virinoj ankaŭ havas filojn?.
- Memkompreneble, filino. Kiel povos alimaniere naskiĝi taksiistoj?